


FLANDRA KATOLIKO

MAANDBLAD VAN HET
KATHOLIEK VLAAMSCH
ESPERANTO VERBOND

K. V. E. V.



MONATA REVUO DE LA
FLANDRA UNUIĜO DE
KATOLIKAJ ESPERANTISTOJ

F. U. K. E.

REDAKTIE : TURNHOUTSCHE BAAN, 277, BORGERHOUT (ANT.)
INTERŝANĜ-ADRESO : F. U. K. E., TURNHOUTSCHEBAAN, 277, BORGERHOUT

Sub la verda stelo

GRAVA SCIIGO

Antaŭ kelkaj monatoj, vi legis en F. K. ke ni vere malprofitas gajnante novajn membrojn. Kvankam tio ŝajnas strange estas tamen la nura vero. La bulteno kostas pli ol vi pagas por ĝi. Ni kalkulis je multaj subtenantaj helpoj, flanke de la kotizo, sed bedaŭrinde tiuj ne efektiviĝis.

Vole nevole ni ek de la nova jaro estas devigataj altigi la kotizon por ebligi al ni daŭrigi sen deficito nian agadon.

Ni ellaboris la altigon je la plej favoraj kondiĉoj, tiamaniere ke vi nur krompagos etan sumon.

Ek de Novembro (la komenco de nia financa jaro) la jaraj kotizoj estos :

Por F. U. K. E.-anoj 20 Fr
Por enloĝantaj familianoj 12.50 (sen la revuo)
Por K. V. E. V.-anoj 15 Fr
Por enloĝantaj familianoj 7.50 (sen la revuo)
Por Eksterlandanoj 20 Fr

La sekcioj pagos 15 Fr po ano.

La sekcio pagos 5 Fr por enskribo en la jarlibro de IKUE.

TAMEN

Tiuj, kiuj pagos antaŭ la 15a Oktobro ankoraŭ ĝuos de la malnovaj kotizoj kaj nur ŝuldos :

15 Fr kiel F. U. K. E.-ano
10 Fr kiel K. V. E. V.-ano
(la specialaj kondiĉoj por sekcianoj forfalas)

Do, nur dependos de via propra volo se vi volas pagi laŭ la nova kaj altigata kotizo !

En tiu-ĉi numero vi trovos P. Ĉ. pagilon.

Uzu ĝin *hodiaŭ*. Ne prokrastu, pagu kaj ŝparu al ni la egan laboron skribi la poŝtkvitancojn post la 1-a de Novembro (altigataj je 0.70 Fr por enkasigo). Montru tiamaniere ke vi taksas la laboron de via estraro, kiu faras sian eblon sub ĉiuj vidpunktoj por la antaŭeniĝo de nia kara F. U. K. E.

La Esperanto-mondo

SALUTLETERO AL HAGA KONGRESO

Flandrujo, la 31-an de Julio 1937.

Al la XIX-a Kongreso de I. K. U. E.

Multaj Katolikaj Esperantistoj el Flandrujo ege bedaŭras ke ili ne povas partopreni al nia XIX-a.

Ili kore salutas la kongreson kaj deziras al ĝi grandan sukceson, sanktan unuecon kaj fruktoplenan laboron.

Esperas iam havi la grandan honoron organizi la I. K. U. E. kongreson en nia bela kaj katolika Flandrujo. Klopodos ĉiam plifortigi la Katolikan Esperanto-Movadon per daŭra kaj sindona laboro.

Dio benu nian karan I. K. U. E. kaj vivu nia XIX-a.

Nome de la Flandra Unuiĝo de Katolikaj Esperantistoj.

RESPONDO EL HAGO

Hago, la 15-an de Aŭg. 1937.

Festo de la Ĉieliro de S. Virg. Maria

Al ĉiuj, kiuj el malproksimo partoprenis NIAN XIX-an.

Karaj samkredanaj samlingvanoj,

Inter la multaj leteroj, telegramoj

kaj kartoj, alportintaj la salutojn al la kongresanoj, la bondezirojn por la Kongreso, kaj la pruvojn de kunvivo per spirita partopreno kaj precipe per preĝoj por la sukceso de NIA XIX-a, sin trovis la via, por kiu nome de la kongres-estraro kaj -anaro mi korege dankas vin.

Mi havis la honoron komuniki pri ili en la solena malferma kunveno.

Dio benu vian laboron fervoran por nia movado katolika esperantista.

Altestime kaj samkredane
servema via

Marreeve

sekr. kas. de NIA XIX-a.

NI IRIS AL KONGRESO

Eble mia prozo ne tre allogos vin, tamen tralegu, karaj FUKĖ-anoj, ĉar temas pri NIA BRILEGA DEKNAŬA en Hago; tio valoras kelkajn minutojn.

Iom post tagmezo, la 1an de Aŭgusto, post lasta estrarkunveno, nia Prezidanto, nia Sekretario kaj S-ro Mortelmans kondukis la «feliĉulojn», t. e. la flandran karavane-ton, en kiu i. a. nia religia konsilanto Sac. Prof. Beckers, al antverpena stacidomo. La unuaj bedaŭrege restis sur la kajo kaj ni spertis poste ke vere ni estis feliĉuloj, ĉar de tiu momento ĝis la fino de la kongreso ĉio disvolviĝis glate, sed ankaŭ rapide... kvazaŭ sur reloj.

Imagu: antaŭ la Hago stacidomo ni unue vidas grandan streĉtukon pri la kongreso kaj plie knabojn kaj skoltojn esperantistajn por gvidi nin; estas ankaŭ esperantistaj tramistoj tre afablaj; tio estas pli ol sufiĉe por alveni senerare en la akceptejon, t. e. en la kripton de la Ridderzaal aŭ Kavalira Salono; ĝi estas unuavide iom mistera kelo kun mallumetaj profundajoj, en kiu ĉe verda tablo malaperas meze de aro da gekongresanoj la kongresa akso — akso ja kutime estas centra. Sed jen, ho miro, la akso elcentriĝas kaj kun streĉita mano venas al ni; mi prezentas al vi S-ron Marreeve, la laboriston, ne nuran laboranton, de la kongreso. Feliĉe li estas helpata de kelkaj sindonaj samkredanoj, kiuj ankaŭ tie deĵoros dum la tuta semajno en la informejo.

Ankaŭ tie funkcias *poŝtofiĉejo*, dank' al la simpatia sintenado de S-ro Inĝ. M. H. Damme, ĝenerala direktoro de la PTT, rilate al nia lingvo: du esperantistaj poŝtistoj tie devis fari kromhorojn por disvendi poŝtmarkojn kaj kvantojn da poŝtkartoj kun esperanta teksto kaj surstampi la korespondadojn per la speciala kongresa ŝtampilo.

Dum ni rigardas ni ricevas *kongreslibron*, kuponojn kaj dokumentojn kaj surmetas la kongresinsignon kiu, inter ni dirite, ne tre efikas; ĉiu ekserĉas la lokon de sia loĝejo sur la Hago plano, esperantlingva, sed sen ia katolika indiko — probable oni uzis jam antaŭe ekzistantan planon. Sed tiun konstaton forgesigas rapide la belaspekta kongreslibro, ne peza sed grava: estas du episkopoj inter la kongresaj prezidantoj kaj en la honora komitato ni nombras tri episkopojn, ok ministrojn kaj eksministrojn, dek parlamentanojn, la dekanon de Hago, la urbestron, tri skabenojn de Hago, tri ĉefredaktorojn de gravaj katolikaj ĵurnaloj, la du ĉefojn de la K.R.O., plurajn altajn personojn el la instruadaj medioj, ktp. el kiuj la episkopo Mon-sro Buckx kaj la urbestro de Hago nin alparolis esperantlingve dum la kongreso. Konstatinte plie ke en la kriptoj oni ankaŭ povas legi, skribi aŭ plifortigi la internan homon, ni reiras al la suno, kiu momente estas supre en la Ridderzaal mem, en kiu okazas la *ĵarkunveno de N. K.*: la aspekto de la salono estas imponega: sub ruĝvelura baldakeno tronas la estraro inter krucifikso kaj granda portreto de Zamenhof pendigitaj ĉe la belaj lanaj tapetoj kiuj ĉirkaŭe kaŝas la murojn; la alta ligna plafono kaj ankaŭ la fenestroj kiuj montras la ŝildojn de la nederlandaj urboj, efike kompletigas tiun kadron, kiun inde plenigos la kongresaj manifestacioj. El la seĝegoj venas renkonte amikaj signoj; la dika tapiŝo feliĉe ensorbas niajn paŝojn, ĉar ni tamen ne intencas interrompi tiajn interesajn priparoladojn.

Sekve de alvoko por E.K. kiu nuntempe certe estas aboninda, laŭ aspekto kaj laŭ enhavo, ni aŭdas fortajn instigojn al *abono de la organo de IKUE* por ke ĉiu efektive kunvivu kun sia unuiĝo; ni plej volonte ripetis ilin al niaj membroj, ankaŭ por ke ili havu pliajn detalojn pri la kongreso, ĉar devige tiu ĉi raporto ne povos esti tre am-

pleksa; Frato van Zon tuj konkludis praktike kaj eklaŭris la vicojn da gekongresanoj: «Ĉu vi jam estas abonanto de E. K.?»; je la fino de la kunveno lia papero jam montras pli ol kvindek novaj abonoj; sekvu do la ekzemplon de viaj nederlandaj samkredanoj kaj ensendu vian abonpagon tuj, ne morgaŭ; abonperanto, preparu paperon. Okaze de propono de la sekcio Breda kiu celis al verko kaj traduko de specife katolikaj libroj sufiĉe ampleksaj, la Prezidanto S-ro Damen estis tiel afabla bonvole atentigi la ĉeestantaron pri *nia itala paketo*, pro kio ni estas tre dankaj al li; dum la kongreso ni disvendis plurajn seriojn (ne tro prokrastu do imiti tiun geston, ĉar kelkaj el niaj libroj rapide elĉerpiĝas). Kaj antaŭ la fino de la kunveno ni ankoraŭ povis aŭdi vortojn tre afablajn por nia FUKĖ. Estis do bona komenco. Ni poste vizitis la interesan *I.K.I. ekspozicion* kiu okupis angulon de la salonego.

Jam je la oka vespere ni retroviĝis en la «Feestgebouw», Willemstraat, por ĉeesti la prezentadon de «*Jozefo en Dotan*» de la sekcio Suda Kruco el Eindhoven. Ĉiu atendis tiun okazaĵon kun multe da scivolo kaj cipe tiuj kiuj konis la faman dramon de J. ankaŭ iom da timo rilate la sukceson, prev. d. Vondel kaj ĝiajn malfacilaĵojn. Mi estas certa tamen ke neniu seniluziĝis aŭ malkontentiĝis kaj tion pruvis sufiĉe la tondraj aplaŭdoj post ĉiu akto kaj je la fino la ovacio al S-ro P. A. Schendeler, la animo de ĉio. Cetere ĉio estis plene laŭdinda: la traduko de S-ro Schendeler estas majstra, ĉar ĝi konservis netuŝitaj la ritmon kaj la spiriton de la verko sen ia perfido; la ĉefaktoroj trafis la ĝustan tonon kaj ludis kun tiom da konvinko ke certaj forperdis la barbon, eĉ la mutaj roloj ne balbutis, kaj ĉiuj moviĝis tiom nature en siaj gustplenaj kostumoj kvazaŭ estis la ĉiutaga; la muzika parto celtrafe kunlaboris je la tutaĵo, kaj la angelhoraj melodifluroj unu-kaj-kvarvoĉaj sendifekte substrekis kaj komentis la dramon kiu nin ne maltenis dank' al la mallongegaj paŭzoj, mirinde mallongaj malgraŭ la videble iom malprofunda scenejo, kiu certe ĝenis la reĝisoran laboron. Prezentado unuaranga kaj sukceso plene meritita.

Lunde matene, kiel cetere ĉiun sekvontan matenon, ni ĉeestis S. Meson kun esperanta

prediko en la Dekana Preĝejo S. Jakobo, Parkstraat. Ĉimatenes estis Solena Meso kun kantoj en Esperanto el la meso de Fr. Schubert, kiun celebris je la 10-a, Parohestro H. Eras, religia konsilanto de N. K. La predikon prizorgis nia bone konata P. Decoene, kiu, en la tago de la festo de S. Alfonso, fondinto de sia ordeno kaj Doktoro de la Preĝo, parolis fervore pri lia doktrino, t. e. pri la neceso kaj la efiko de la preĝo ĉiutaga por venki la barojn al nia anima savo kiel ekz. ĉe S. Lidvino el Schiedam, por realigi la sanktecon kaj la amon al Dio en ni, eĉ ĝis la morto kiel ĉe la S. Martiroj de Gorkum, kaj por fruktedonigi nian apostolaton; ĉiu esperantisto devas esti apostolo per la ekzemplo, la parolo kaj la skribado; ni preĝu ankaŭ dum nia kongreso por ĝia sukceso kaj por ke la ne-katolikoj povu glori Dion kun ni.

Post la meso ekestis vigla interbabilado antaŭ la preĝejo ĉar multaj kongresanoj alvenis depost hieraŭ. Kelkaj devis ankoraŭ iri en la akceptejon, aliaj iris al la de la plimulto elektita filia kongresejo, la tute apuda Heck-restoracio.

Tio ankaŭ necesis por inde ĉeesti je la 2a la *solenan malfermon en la Kavalira Salono*; solena ĝi estis ĉar estis la malferma kunsido de la kongreso, solena ĝi estis ankaŭ pro la kadro kaj pro la granda nombro da aŭtoritatuloj kiuj ĝin ĉeestis.

Ni notis la ĉeeston i. a. de Mon-sro J. M. v. d. Tuyn, dekanon de Hago; Jur. D-ro. C. M. J. F. Goseling, Ministro de Juraferoj; S-ro J. van Andel, reprezentanto de la Ministro de Instruado, Artoj kaj Sciencoj; S-ro Max van Poll, parlamentano; S-ro Ch. van der Bilt, eksparlamentano; S-ro A. C. De Bruyn, senatano; S-ro Groeneyk, nome de Inĝ. M. R. Damme, ĝenerala Direktoro de PTT; Jhr Jur. D-ro. L. van Nispen tot Sevenaer, ĉefredaktoro de Residentiebode, ĉiuj membroj de la Honora Komitato.

Plej videble impresis la manko de la Honora Prezidanto, nia esperantista Episkopo Mon-sro Dro Eltschkner el Praha kiu intencis ĉeesti sed ne povis pro siaj episkopaj devoj.

La salono estis plenplena kiam ĉiuj ekstaris kaj eksonis el kvincent buŝoj la kantoj «Vilhelmino», esperantigo de la «Wilhel-

mus», kaj «Ni volas Vin».

Tiam prenis la parolon S-ro P. M. Brouwer, prezidanto de la LKK, por la malferma parolado. Li bonvenigas ĉiujn en la salono kie ĉiujare aŭdiĝas la voĉo de la Reĝino kaj esprimas sian ĝojon ĉar Hago estas elektita por la XIXa kaj ĉar multaj homoj venis el diversaj popoloj kaj klasoj; ilin ligas la sama Kredo, la samaj idealoj, la sama lingvo, kaj tiu lingvo efektiviĝos interkomprenon kaj interfratigon. Li dankas ĉiujn kiuj venis, esperantistoj kaj ne-esperantistoj, altranguloj kaj simplaj homoj, kaj deziras al ĉiuj neforgeseblan kongreson.

Sekvas S-ro H. Damen, prezidanto de la organiza komitato: li akcentas la valoron de nia kongreso kiel manifestacio de Internacia Katolika Agado. Jam la pur-lingvan Esperanto-movadon oni nomas «sankta afero», kiom pli rajte ni povas nomi «sankta» nian katolikan Esperanto-movadon. Nomo de N. K. li dankas la estraron de IKUE pro ĝia honorplena invito al NK organizi la kongreson en Nederlando kaj ankaŭ ĉiujn kiuj aliĝis por kunhelpi al la disvastigo de niaj katolikaj idealoj pere de nia internacia lingvo. Li rememorigas la antaŭajn kongresojn kiuj okazis en Nederlando: «Nia Dua» en 1911 en Hago, «Nia Ses» en Hago en 1920, la kongreso de Nijmegen, poste «Nia Dektria» en Tilburg en 1928. Li laŭdas la ĉeĥajn samkredanojn pro la Brno-a kongreso. La antaŭsignoj de tiu-ĉi kongreso estas favoraj, ĉar volonte la aŭtoritatuloj, tiel ŝtataj kiel ekleziaj, kunlaboris. Li deziras plenan sukceson al la kongreso por la disvastigado de la katolikaj principoj.

En sia malferma parolado, S-ro Heilker, kongresprezidanto, bonvenigas kaj salutas la eksterlandanojn en la tria Hago IKUE-kongreso en la libera Nederlando kaj proponas sendi telegramon al la aminda Reĝino de tiu-ĉi lando, al Lia Ekscelenco Monsro Huibers, episkopo de Haarlem, kiu aprobis la pritraktotajn temojn kaj tiel bonvole sendis reprezentanton, kaj al Lia Sankteco Papo Pio Dekunua, nia komuna Patro, (Aplaŭdo). Poste li alparolis nederlandlingve la aŭtoritatulojn, ekleziajn kaj ne-ekleziajn: per rigardo al la Honora Komitato, ni povas diri ke nia kongreso havas oran kadron kaj tio estas plej harmonie kun

la ora jubileo de Esperanto kiun ni pri-festas; li pro tio dankas ĉiujn honorkomitatanojn; ni nun ekpentras en tiu kadro kaj klopodos labori kiel eble plej bele por fari el pentraĵo kaj kadro harmonian tutajan.

Post leviĝo de ĉiuj, li daŭrigis esperantlingve por honoro la memoron de nia Prezidanto, profesoro Font Giralt pri kies martirmorto ni nun estas certaj. Dio lin jam rekompencis en la ĉielo, li preĝu por ni kaj petu la Dian benon super nia kongreso kaj la gracon por la nova Prezidanto imiti lin en ĉio.

Poste *Mon-sro van der Tuyn, Dekano de Hago*, transdonas al la kongreso la patran saluton de la episkopo de Haarlem, *Mon-sro J. P. Huibers*, Prezidanto de la Honora komitato, malhelpata ĉeesti, kaj deziras ke ĝi portu multajn belajn kaj maturajn fruktojn; tiel ni ĉiuj povas potence kunlabori je la disvastigo de la Dia Regno sur tero kaj estas, se ni nin fiksas al la eklezia hierarĥio, tre taŭga organo de la katolika agado sur la tuta tero; pro tio la Episkopo promesas al ni Siajn Preĝojn kaj volonte donas al la kongreso Sian episkopan benon.

S-ro Heilker dankas pro la trafikaj kaj honorigaj paroloj kiuj montras ke la Episkopo komprenas la gravan rolon de Esperanto por Eklezio kaj Kredo kaj petas *Monston v. d. Tuyn* transdoni al Lia Moŝto nian tutkoran dankon pro Liaj salutoj kaj episkopa beno.

S-ro *C.M.J.F. Goseling, Ministro de Juzaferoj*, promesas transdoni la deziron de la prezidanto ke Esperanto iĝu lernfako en la lernejoj, al Sia kolego la Ministro de Instruado, Artoj kaj Sciencoj. La multnombraj nuntempaj kongresoj montras klopodojn al plibonigoj, sed la Esperanto-movado montras la eblecon de pli bona interkompreniĝo kaj de akcelo de pli bona rilato de la solidareco inter la popoloj. La katolikaj esperantistoj povas tiel fari el sia movado laboron agrablan al Dio. Fine oni neniam rigardu la internacian laboron kiel supernacian ringegon, sed lasu spacon por sana malfaldo de la nacia karakterizo, tiam ankaŭ la Nederlanda registaro donos sian plenan subtenon al nia movado.

S-ro Heilker dankas la Ministrin, precipe pro Lia promeso transdoni nian deziron

al la Ministro de Instruado kaj deklaras ke ni samopinias kun Li, ke Esperanto estas kultura faktoro.

Poste *Patro Lektoro J. Dito O.P., gvidanto de la K.R.O.*, kiu elsendis tiun-ĉi malferman kunsidon, prelegis esperantlingve pri «Radio kaj Esperanto». La sonoj estas transportataj tra la tuta mondo. La muziko estas jam internacia, kaj ankaŭ ĝiaj signoj tiel ke ĉiu muzikisto povas aŭdiĝi la per notoj esprimita pensado de kiu ajn komponisto. La pensoj tamen esprimitaj per vortoj estas jes ĉie aŭdeblaj, sed nur de tiu persono kompreneblaj kiu lernis la koncernan lingvon. Kaj per sia unu buŝo, homo ne kapablas paroli samtempe pli ol unu lingvo. do... la plej granda parto de la aŭdantaro ne komprenas lin. Ni, Katolikoj, havas ion por diri al la tuta mondo kaj por tio ni nepre devas atingi la mondon tutan. Per Esperanto kaj la katolika mikrofono de K.R.O. kiel ĝemeloj, jam multe da bono estas farita por nia komuna katolika afero kaj jam multaj trovis la vojon al la Sankta Eklezio. Malgraŭ siaj malamikoj, Esperanto ekzistas kaj restos kaj kreskos kaj venkos, ĝi jam ekzistas 50 jarojn kaj fariĝis vivanta lingvo. Nomo de K.R.O., P. Dito salutas la kongreson, deziras al ĝi plej bonan sukceson kaj promesas pluan subtenon, konvinkite ke nia lingvo kaj ĝia mikrofono, precipe en la venonta tempo, sin reciproke urĝe bezonos.

En sia dankvorto S-ro Heilker nomas tiun tagon la edziĝa festo de Radio kaj Esperanto; li donas la parolon al S-ro v. *Nieuwstraten*, kiu, nome de la Urbestro de Hago, malhelpata ĉeesti, salutas kaj bonvenigas esperantlingve la kongreson kaj esprimas la jam multjaran simpatian de la Urbestro al Esperanto, kiun li cetere konas. La urbestro jam esprimis sian miron, en internaciaj kongresoj, ke la mondo ne estas pli saĝa, kaj opinias ke oni sanigu la mondon per reciproka kompreno, por kio plej taŭge helpas Esperanto. Zamenhof metis en sian lingvon internacian sian amon al la homaro kaj sian idealismon, kaj tio atingis ĝiajn rezultatojn. Nia kongreso atingi la rezultatojn kiujn ni esperas kaj ĉiurilate sukcesu, kaj ni malkovru la belecon de Hago.

S-ro Heilker petas S-ron v. *Nieuwstraten* transdoni nian dankon tutkoran al la

urbestro kiu esprimas tiel ĝuste ankaŭ niajn pensojn. Ni certe kredas, ke, kiam la tempo estos veninta, Hago estos unua por enkonduki Esperanton en la lernejojn, dank' al la fervoro de sia urbestro.

Post tio venas la vico de la eksterlandaj salutparoloj. Sinsekve salutas D-ro Naster por Belgujo, F-ino Royer por Francujo, F-ino Penzova por Ĉeĥoslovakujo, S-ro Golobiĉ por Jugoslavujo, Kanoniko D-ro Rotondo por Italujo. D-ro Naster diras nian kuraĝon al laboro kaj speciale substrekas la daŭran kunlaboron de FUKU kaj UVE, dank' al la racia solvo de ekzisto de du lingvaj unuiĝoj en nia dulingva lando. Li esperas ke post du aŭ tri jaroj ni estos sufiĉe fortaj por povi inviti niavice la kongreson en Flandrujon... kaj li esperas nun ke ĉiu el vi, FUKU-anoj, de nun eklaboros por helpi nin atingi tiun rezultaton, ĉu?

La Prezidanto ankoraŭ transdonas la multajn salutojn kaj bondezirojn kiuj alvenis letere aŭ telegrame, unue tiujn de la Papa Internuncio Monsro Paolo Giobbe en Hago kaj de *Mon-sro Eltschknor* el Praha, poste multajn el Nederlando, Flandrujo, Ĉeĥoslovakujo, Aŭstrujo, Hungarujo, Polujo, Anglujo, Francujo.

La grava kunveno tiam finiĝis per kanto de La Katolika Himno kaj estis tuj sekva de *fotografado en la Binnenhof* antaŭ la kongresejo. NOMO (daŭrigota)

JAMBORE-EROJ

Ne atendu rakonton pri ĉio kion mi vidis en la tiom diversa kaj interesa tendaro, jen nur kelkaj prilingvaj konstatoj faritaj en kaj ĉirkaŭ la «Babelo».

Ĉar Babelo ĝi estis.

Ni tralegu hazarde kelkajn ĵurnalojn:

Maasbode, pri la lunda tendarfajro: «Estis necesa malbono, ke tio, kion diris la «tendarfajrĉefo, devis esti klarigata en aliaj «lingvoj, tiel ke multe da tempo perdiĝis «kaj nur sufiĉe malfrue oni vere povis ko-«menci.» — NE, ne necesa. Sinjoro.

Ankoraŭ el *Maasbode*, de ĝia skoltkorrespondanto: «Feliĉe estas ĉi-tie bona okazo «por kaŝi vian nescion pri ia informpeto. «Vi nur parolu fremdan lingvon kaj jen, «estas en ordo.» — Sed kie estas la skolta he'pemo?

El *Libre Belgique*, pri la lunda posttagmezfesto: «Bedaŭrinde la parolisto kiu «mirinde parolas la nederlandan, anglan kaj germanan lingvojn, ŝukcesis fari el la franca «specon de germana dialekto ridetiĝanta la «ĉeestantaron.» — Kaj kion komprenis tiuj kiuj ne konis unu el la kvar lingvoj?

El *Residentiebode*: «Oni havas la impreson ke ĉiu vizitanto — ankaŭ ĉiu lupido — «nur per siaj unuaj paŝoj sur la jamboreo-tereno, iĝis poligloto.» — Rekordrapide, ĉu?, kaj iom poste: «La internacia sfero «tuŝas ĉiun: la Nederlandano rememoriĝas «subite ke li iam lernis du vortojn da franca, «tri da angla kaj iom da germana lingvo, «kaj, provizita per tiu «scio», li ekkonverŝacias kun fremdlandanoj... estas la fra-«teco...», sed ĉu vere estis ankaŭ interkompreniĝo?

Ĉiu povis cetere sufiĉe konstati similajn faktojn.

«Change?» estis ja internacie konata vorto, eĉ de la plej malgranda esperokolora lupido, sed post tiu demando komenciĝis kutime la komika se ne bedaŭrinda flanko de la afero — ĉar afero tio estis, ĉiu dezirante ricevi plej grandan valorajn por sia intersanĝobjekto —; plejofte post provo per unu aŭ du lingvoj ambaŭflanke, oni devis plukomeri per mikslingvaĉo kaj gestoj se neniu proksima bonvolulo scipovis kvar aŭ kvin lingvojn: pli bona kompreno ekzistis inter la surdmutaj skoltoj. Tio ja ne malebligis la intersanĝkomercon, ĉar plej hibridajn vestarojn mi povis vidi el naciecoj...nekonataj; sed per la lingvo vi ne povis juĝi pli certe ĉar plej nature nederlanda skolto vin alparolis kelkfoje german- aŭ anglalingve, tamen ne en Esperanto, krom esceptoj.

Ĉeestis ja esperantistaj skoltoj, ne multaj tamen; kaj ofte ili portis la insignon nevideble aŭ... tute ne. Malgraŭ tio mi agrable renkontiĝis kun skoltesperantistoj hungaraj (ĉu ne, Miĥaelo?), ĉeĥaj, polaj, aŭstraj, nederlandaj, litovaj... kaj eĉ flandraj inter kiuj nia delegito J. Van Gulck, Ĝenerala Sekretario, Esperanto-Sekcio de la B. B. P. S.

Cu tiuj esperantistaj skoltoj kunvenis dum la jamboreo? Jes, ili kunsidis la 5-an de Aŭgusto ĉirkaŭ la verdstela flago kaj havis

plej fratecan kontakton. Feliĉa hazardo estis la preterpaso de la K. R. O. — aŭtomobilo kiu surdiskiĝis la kunvenon kaj eble tiel ni povos iam ĝin ĉeesti perradie.

Ĉu Esperanto estis uzata en la jamboreo? Jes. Certe la skoltesperantistoj ĝin uzis okaze. En la poŝto nur deĵoris esperantistaj oficistoj, dank' al la ĝenerala Direktoro de la PTT, Ing. M. H. Damme. En la banko oni alparolis unue esperantlingve la eksterlandanojn. La Haga kongreso vizitis la jamboreon, bedaŭrinde tro preterfluge por povi grave impresi diversnaciajn skoltestrojn.

Ĉu Esperanto estis subtenata en la jamboreo? Ne!!! Ŝajne la Chief ne kontraŭas Esperanton. Sed la nederlanda jamboreestraro malpermesis la Esperantan kunvenon... kiu tamen okazis, sed grave malhelpata (strange: la sinteno de la berlinaj olimpiaj ludoj ripetiĝas en la libera Nederlando; kia libereco!).

Mi scias ke fervoraj nederlandaj samideanoj faris ĉiun sian eblon por forhelpi tiun malpermeson kaj jam longe antaŭ la jamboreo laboris, ankaŭ instruante Esperanton al skoltoj, sed sen oficiala subteno ilia tasko estis certe malfacila.

Ĉu necesas diri ke la celita interfratiĝo de la 30.000 el proksimume 40 landoj, kvankam ege bonvola, tiom flanke de princoj kaj principoj kiom de plej simplaj homoj, estis ofte malhelpata de la lingvaj baroj?

Konsoĉa estis tamen la kora interfratiĝo de la 15.000 katolikaj skoltoj per la liturgio, kiam ili kune kantis... latinlingve dum la dimanĉa Pontifika Meso: Laudate Dominum omnes gentes, aŭ kiam la unuan vendredon de Aŭgusto ili pie komuniĝis por povi, laŭ la paroloj de Mon-sro Huibers, kun entuziasmo laŭvivi la skoltismon en sia katolika Kre'lo, aŭ kiam, dum la lasta nokto ili adoradis la S. Eŭkariston, preĝante por la mondpaĉo, difinita per la superskribo de la altaro mem: Pax Christi.

Dum la finfestoj en la areno estis ja bela simbolo la kantado de la jambore-kanto samtempe en 45 diversaj lingvoj, simbolo de frateco kaj simbolo de lingvokonfuzo.

Sed mi pli ŝatas la fakton de la katolika unueco, ĝis kiam ĉiuj skoltoj vere akcelos nian internacian helplingvon, per kiu pli

facile plenumiĝos la deziro esprimita de la Chief dum la skoltgazetarkonferenco, ke ili ankaŭ internacie intersanĝu siajn ideojn por akceli la mondfratecon, kaj per kiu la katolikaj skoltoj plej bone povos esprimi kaj atingi sian unikan katolikan idealon.

NOMO.

Nia movado

GRATULOJ. — En la Familio Cammaert-Streitz, nia delegito por Ste Maria-burg, naskiĝis la 20-7-1937 fileto Marc.

Fuke kore gratulas la feliĉajn gepatrojn.

DANKON. — Sekve al nia alvoko en nia pasinta numero, kelkaj membroj kaj amikoj sendis al ni la demandintajn numerojn de Flandra Katoliko kaj jarlibrojn de IKUE. Al la sendintoj de la jarlibro ni jam rekompence sendis la Caroli preĝareton. Ni ankoraŭ ripeas nian peton kaj saman rekompencon ni sendos.

PREĜARETO. — Por ebligi al ĉiuj niaj anoj akiri poŝpreĝareton enhavantan la ĉefajn preĝojn, ni decidis malaltigi la prezon de la preĝareto Caroli: ek de nun ĝi nur kostas 3 frankojn. Esperas ni ke baldaŭ nian F.U.K.E.-ano malhavos ĝin.

SUBTENO F.U.K.E. — Por nia kara revuo Flandra Katoliko el Geluwe J.D. 5.
Por ke grava problemo ni bone povu solvi 20.
Pro la ĝoja mistifiko de la wilrijkano (?!?) 4.75
Je la honoro de nia senlaca Blankulo (D.B.) 10.
Por aĉeti la silenton pri malfruiĝo N. M. 10.

POR NIA PESILO. — Ĉu jam okazis al vi ke la poŝtisto postulis krompagon kaŭze de ne sufiĉe afrankita sendaĵo? Returne vi ja ricevas belan (?) punmarkon, sed tio ne forprenis vian malbonan humoron kontraŭ tiu kiu estis la kulpo de tia malagrabla pago.

Nu, la estro de nia vendinstituto, tre kapblas kalkuli la valoran de la sendaĵo, sed ne ankoraŭ sufiĉe sperta estas por taksi la pezon. Tiamaniere li jam kelkfoje estis la kaŭzo ke kelkaj bonvolemaj aĉetintoj estis rekompensataj per..... punmarkoj.

Por estonte eviti tiajn malagrablaĵojn ni ĉi sube malfermas novan rubrikon por ebligi al ni aĉeti pesilon. La mono estu sendita al la P.Ĉ. de K.V.E.V., Aalst, No 412.354.

— Viktimo de mal-pesilo. Maldika Calciviro 10.—
— Oni rifuzis mian helpkongreskotizon; Jen, per ĝi oni parte pagu la pesilon. D. J. 16.—
— Nenia vendejo, sen bona pesilo D. M. 10.—
— Pesu ĝuste (Met de maat waar mede gij zult gemeten hebben.....) L. C. 10.—

ABONO AL ESPERO KATOLIKA POR 15 Fr. — Por ebligi al ĉiuj niaj anoj akiron de la bela, interesplena kolekto de 1937 (escepte la unuan numeron, elĉerpita) la abonperanto sendos la jam aperintajn numerojn kaj enskribos vin kiel abonanton ĝis fino de 1937, se vi pagas Fr. 15 al la poŝtĉekkonto No 209.034 de L. Calloens, Aalst. Notu bone ke la jarabono por 1938 restas 24 Fr.

RADIO-FAKO. — Ĉiuj aŭde dum la K.V.R.O.-novaĵoj Vi aŭdos ankaŭ FUKEnovaĵojn dum Septembro. Jaŭdon la 30-an de Septembro, nia Unuiĝo dissendos pere de K.V.R.O. je la 18.45-a, interesajn sciigojn pri FUKEnovaĵoj kaj aŭdigos la diskojn; La Espero. La Tagiĝo, Ario el Rigoletto (tenoro Karl Jöken) kaj la ario de Don Escamillo el Carmen. Ne necesas diri, ke ni invitas ĉiujn FUKEnovaĵojn aŭskulti kaj aŭskultigi tiun dissendon, ĉu? Danku karte KVRO'n, Ste Barbarastr. 13, Loveno pro tiu okazintaĵo. Dependas de la influo de multnombraj kartoj por ke ni estonte povu disponi je kvaronhoreto ĉe K.V.R.O. Ni rememoras, ke okaze de la antaŭa dissendo (Patro Dumoulin, S. J. kaj nia Prezidanto, 24a Septembro 1936) ne malpli ol 30 leteroj kaj kartoj sole envenis ĉe la Prezidanto kaj sekretario.

VLAAMSCHE RADIO-OMROEP. — LOKSBERGEN. — Ni ankaŭ anoncas ke en V.R.O., Turnhoutschebaan 26, Diest, komenciĝos Esperanto-kurso la 3-an de Oktobro sekvanta.

Estos kurso en 10 lecionoj laŭ la libro de Witterijk, «Het Esperanto in 10 lessen», havebla je 5 Fr, pagotaj al p. ĉ. No 412.354

de KVEV, Aalst. Estos ankaŭ eble ensendi la lecionojn por korektado al la jena adreso : S-ro Jos. Goethaert, Prins Leopoldstraat, Borgerhout, kiu zorge ilin korektos kaj aldonos la necesajn klarigojn kaj rimarkojn. La lernantoj pagos por tiu servo nur 10 Fr (same pageblaj al p. ĉ. No 412.354 de KVEV, Aalst) kaj aldonos 70 centiman poŝtmarkon al ĉiu leciono por resendado.

Ni speciale rekomendas al niaj membroj de Limburgo, Brabant kaj Antverpeno kiuj ŝatas sekvi tiun kurson, mendi la libron kaj ĝiri la necesajn sumojn. Ni antaŭvidas grandan alfluan de mendoj post la enkonduka parolado de la 3a Oktobro. Bonvole do helpu nin per tuja mendo por ke nia eksped-servo ne estu superŝutata kaj havu la tempon servi ĉiujn ĝustatempe.

KATOLIKA RONDO ESPERANTISTA. — MORTSEL. — La 22-an de Julio ni havis la plezuron akcepti S-ron Macek el Bratislava, ĝenerala sekretario de la slovakaj skoltaj, kun lia edzino, kaj S-ron Wim van Heugten, ĵurnalisto el Deurne, N.Br.-Nederl., kiu ilin akompanis al la Jamboreo kaj al la internacia katolika kongreso. La vizito al Antverpeno multe plaĉis al ĉiuj gesamkredanoj, kies konatiĝo estis al ni agrabla kaj interesa.

ESPERANTO-EKSPOZICIO. — Ni havas la plezuron sciigi al vi ke de la 18-an ĝis la 20-an de Septembro okazos tre grava Esperanta Ekspozicio en LEUVEN (Belgujo). La Lovena Urbeŝtaro oficiale disponigis al la organizantoj la suban salonegon de la Palaco de Belaj Artoj.

Siaflanke la Centra Poŝtstraro aranĝos, en la ejon de la Ekspozicio, specialan poŝtoŝtampojn, kiu uzos, por ŝtampi la sendotajojn, SPECIALAN ŜTAMPILON kun Teksto en Esperanto. Okaze de tio estos eldonataj, du diversaj memoraj poŝtkartoj afrankitaj per poŝtmarko de 0,35 belg. fr. kaj ŝtampitajn per la speciala ŝtampilo. La unua karto estas nur obtenebla per antaŭmendo. La dua estas vendata en la Ekspozicio, sed estas ankaŭ obtenebla per antaŭmendo. Oni direktu mendojn kaj koncernen pagon per poŝtmandato al

S-ro Lode CNOPS Broekstraat, 21 Heverlee (Leuven)

La prezo estas UNU BELGA FRANKO po karto. Oni aldonu poŝtelspezojn : 1,75 fr. po dek kartoj, plus unu franko po ĉiuj dek kartoj pli. (Registrado 1,75 b. fr. pli) Grupigu la mendojn !

ESPERANTO-KURSO NIJMEGEN. — Reeds meer dan 10 jaren wordt door de Centrale Esperanto Propaganda Commissie te Nijmegen met veel succes de bekende schriftelijke leergang «*Centra Esperanto Kursus*» verzorgd. Deze cursus, die volledig opleidt in de internationale taal Esperanto, duurt jaarlijks van 1 Oct. tot 1 April, en kan worden gevolgd door ieder, die slechts de lagere school doorloopen heeft.

De cursus bestaat uit 26 mooi gedrukte lessen (en een gratis woordenboekje). De lessen worden *wekelijks* franco toegezonden en dan een week later voor de microfoon van Hilversum 1 behandeld. De behandeling voor de radio zal dit jaar op *zeer prettige en leerzame wijze plaats hebben, n. l. door den leeraar en een cursiste samen!* (De cursus is echter ook heel goed te leeren zonder radio.)

Zij die zich *nu aanmelden*, zullen dadelijk de 1e les, en premie (zoolang de voorraad strekt) een portret van Dr Zamenhof, (de meester van het Esperanto) en tevens het Esp. lied, ontvangen !

Ieder ijverig cursist zal met enkele uren studie per week, het Esperanto volledig leeren, zoodat hij het in alle opzichten gebruiken kan. De Cursus leidt ook op voor de examens.

De prijs bedraagt fr. 65 — Adres voor Vlaanderen :

Esperanto, Erembodegemstr., 29 AALST (O. Vl.)

AŬSKULTU NIAN «*RADIOPRAATJE*» ĈIUN SALATON, JE LA 16. 15-a h.

Pro la tre interesa raporto pri la Haga kongreso, farita de nia Vic-prezidanto, ni estis devigataj prokrasti plurajn rubrikojn kaj artikolojn. Niaj kunlaborantoj kaj legantoj do senkulpigu nin. Ili aperos en Flandra Katoliko No 10, i. a. la respondojn de Blankulo al C. L. el St-A., O. V. v. V. el B., J. D. B. el H.